

Claude Gacond intervjuas s-ron Giorgio Silfer
pri Literatura Foiro
SRI-1977-11-B-8-86

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-11/SRI-1977-11-B-8-86-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-s-ro-Giorgio-Silfer-pri-Literatura-Foiro.mp3>

CG.- Parolas Claude Gacond kun s-ro Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de Literatura Foiro. En niaj elsendoj ni ofte havis laokazon citi erojn el artikoloj aperintaj en Literatura Foiro. Ni hodiaŭ havas la honoron babili kun ĝia ĉefredaktoro, s-ro Giorgio Silfer. Italo loĝanta en Finnlando, kie li estas instruisto pri Esperanto kaj pri romanidaj lingvoj. Sinjoro Giorgio Silfer, vi konscias ke Literatura Foiro estas ofte menciata ĉe la esperantlingvaj radioj. Kiu estas laŭ vi la sekreto de tiu ĉi interesiĝo pri Literatura Foiro fare de la radioj?

GS.- Vere mi devas diri unue ke tiu ĉi interesiĝo estas efektive la plej alte taksata rekompenco por la longjara laboro kiun mi kaj la stabo de Literatura Foiro, ekde la redaktoroj ĝis la plej humilaj organizaj klunlaborantoj plenumis. Laŭ mi ni povas sintezi ĉi tiun sukceson pere de la simpla devizo de Literatura Foiro, kiu volas esti revuo en Esperanto kaj ne esperantista revuo. Temas pri tio, ke ni celas doni pere de Literatura Foiro la ekzemplon de gazeto, kiu servas al la starigo de kultura alternativo, sendepende de la esperanta subkulturo. Kvankam en strikta rilato kun esperantologio, kun la esperanto-literaturo, kun lingvistiko, kaj tiel plu. Evidente nia celo estas fari gazeton, kiu estas legebla kaj akceptebla kaj ŝatinda, eĉ se ĝi estus tradukita en nacian lingvon. Fari ion, kio morgaŭ povas esti eniata fare de nacilingvanoj al esperantlingvanoj.

CG.- Nuntempe unu el la tri redaktoj de Literatura Foiro troviĝas en La Chaux-de-Fonds. Tio emfazas la kunlaboron, kiu ekzistas inter Kultura Centro Esperantista kaj Literatura Foiro. Ĉu vi, sinjoro Silfer, povus paroli pri la interna strukturo de tiu ĉi internacia kultura revuo, Literatura Foiro, kiu aperas tute regule jam la okan jaron, se mi ne eraras.

GS.- Vere, ni komencis en 1970-a, ĝuste en la monato junio, do ni festas nuntempe nian okan datrevenon. Ĝis nun aperis 43 numeroj, do eĉ ni preterpasis la rekordon de nia grava antaŭulo, la Nica Literatura Revuo. La strukturo de Literaturo Foiro, do eble ni povas kompari ĝin al iu Liliputa, multnacia konzerno, nome ni havas tri redaktojn, la norda estas la ĉefredakto de Literatura Foiro en Finnlando, la suda, kiu rolis kiel ĉefa redakto ĝis antaŭ du jaroj estas en Milano en Italujo, kaj en Svislando ni havas la okcidentan redaktojn. La gazeto estas administrata de iu konsilantaro, kies prezidanto estas sviso, d-ro Tazio Carlevaro, itallingva sviso, kaj de tiu administra konsilantaro dependas la ĉefredaktoro kaj la ceteraj kunlaborantoj. Finance Literatura Foiro estas tute memstara. Nome ĝi vivas danke al la abonoj, danke al la bonŝanco ĉiam pli oftaj reklamoj de ne-esperantistaj entreprenoj, ĉefe turismaj, kaj ankaŭ danke al la bonfaro de kelkaj paralelaj iniciatoj, kiel la librofako aŭ la literatura konkurso, ĉi-jare premio Aŭtoro de la jaro kaj en la estonto, premio La verko de la jaro, mi devas diri konklude, ke la Patrolo, tiu ĉi itala kerno, kiu estis la iniciatinto de Literatura Foiro, pli kaj pli akcelis la internaciigon de tiu ĉi revuo, kiu en sia administra konsilantaro nuntempe havas ankaŭ francojn, finnojn, nederlandanojn, kaj en sia multnacia kunlaborantaro havas usonanojn, japanojn, kaj tiel plu.

CG.- Vi menciis la nomon, la Patrolo. Estus interese iom klarigi, kio kaŝiĝas malantaŭ tiu ĉi nomo.

GS.- Ĉi tie mi devus eble longe paroli, ĉar la Patrolo en sia preskaŭ dekjara vivo plenumis multajn iniciatojn fakte en esperantujo. Mi diru, ke ĝi estas tre koncize rondo de italaj aŭ itallingvaj literaturistoj, kiuj tamen decidis elekti Esperanton kiel propran kulturan kaj literaturan perilon.

CG.- En la venonta semajno ni faros al vi aliajn demandojn, specife pri la literatura rondo, la Patrolo.

Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Giorgio Silber, ĉefredaktoro de Literatura Foiro. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2013*